## UEA, KUNLABORE KUN VARIG, ORGANIZAS FLUGOJN AL KAJ EN BRAZILO

Ĉi-jare UEA organizas flugojn al la kongresa lando, kunlabore kun Varig, la plej granda latinamerika flugkompanio.

Por via komforto, ni proponas dek malsamajn eblojn flugi al Fortalezo: nur por la kongresa semajno, aŭ kombine kun antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj.

Ĉiuj flugoj devas okazi pere de Varig. La prezoj estas kiom eble plej malaltaj kaj temas pri aparta oferto de Varig nur al UEA. Tamen, pro limigita kapacito, ni ne povas garantii ke ankaŭ la malfruaj mendoj ricevos tiun rabaton. Tial gravas ke vi mendu kiel eble plej frue.

Kaze ke la rabatitaj lokoj elcherpiĝos, UEA kaj Varig ĉiam provos oferti la plej malaltajn tarifojn.

La prezoj rilatas nur al ekflugoj el Frankfurto, Londono, Madrido, Milano, Parizo kaj Tokio, kaj temas ekskluzive pri Varig-flugoj. Se vi deziras komenci vian vojaĝon de alia flughaveno, tiam ni provos oferti la plej malaltan tarifon inter tiu flughaveno kaj unu el la aliaj ses deirhavenoj jam menciitaj.

Ni ankaŭ povas trakti petojn, kiuj rilatas flugojn al urboj en Brazilo kiuj ne aperas en la kombinoj, se la internacia flugo al Brazilo estas de Varig. Sed bv. kompreni ke la prioritato estas la trakto de la kombinoj.

La kombinvojaĝoj inkluzivas la flughavenajn impostojn kaj, se parto de antaŭ aŭ post kongreso, transportojn el kaj al la flughavenoj en Brazilo, kaj esperantlingvajn ĉiĉeronojn. Ne inkluzivita: tranoktoj en hoteloj.

La limdato por mendi kun la speciala rabato estas la 28-a de februaro!

**K1a** kombinvojaĝo por la antaŭkongresa ekskurso A1 – rio kaj salvador

25/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 26/07 alveno al Rio de Janeiro. 30/07 Forflugo al Salvador da Bahia. 02/08 forflugo al Fortalezo por la kongresa semajno. 12/08 forflugo de Fortalezo al São Paulo por preni la internacian flugon reen al Eŭropo.

*1565,00 EUR*

**K1b** kombinvojaĝo por la antaŭkongresa ekskurso A1 – rio kaj salvador

26/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 27/07 alveno al Rio de Janeiro. 31/07 forflugo al Salvador da Bahia. 03/08 forflugo al Fortalezo por la kongresa semajno. 13/08 forflugo de Fortalezo al São Paulo por preni la internacian flugon reen al Eŭropo.

*1565,00 EUR*

**K2a** kombinvojaĝo por la antaŭkongresa ekskurso A2 – jericoacoara

28/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 29/07 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo. 12/08 vi flugos matene el Fortalezo al Rio de Janeiro kaj havos tiun tagon por ekkoni la urbon. 13/08 forflugo reen al Eŭropo. (bv. mendi hotelon por la nokto de la 12-a de aŭgusto!)

*1075,00 EUR*

**K2b** kombinvojaĝo por la antaŭkongresa ekskurso A2 – jericoacoara

29/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 30/07 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo. 13/08 vi flugos matene el Fortalezo al Rio de Janeiro kaj havos tiun tagon por ekkoni la urbon. 14/08 forflugo reen al Eŭropo. (bv. mendi hotelon por la nokto de la 13-a de aŭgusto!)

*1075,00 EUR*

**K3** kombinvojaĝo por la postkongresa ekskurso P1 – iguaçu kaj rio

31/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 01/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi flugos al Fortalezo por la kongresa semajno. 10/08 vi flugos de Fortalezo al Foz do Iguaçu. 12/08 vi flugos al Rio de Janeiro. 15/08 vi revenos al Eŭropo el Rio.

*1565,00 EUR*

**K4** kombinvojaĝo por la postkongresa ekskurso P2 – amazonio kaj rio

31/07 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 01/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo por la kongresa semajno. 10/08 vi flugos de Fortalezo al Manaus. 13/08 de Manaus vi flugos al Rio de Janeiro. 15/08 revenflugo el Rio al Eŭropo.

*1565,00 EUR*

**K5** kombinvojaĝo por la postkongresa ekskurso P3 – plejoj de brazilo

01/08 forflugo el Eŭropo (Frankfurto, Londono, Madrido, Milano aŭ Parizo). 02/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo por la kongresa semajno. 11/08 flugo de Fortalezo al Manaus. 14/08 de Manaus vi flugos al Foz do Iguaçu. 16/08 el Foz do Iguaçu flugo al Rio de Janeiro. 19/08 vi flugos reen al Eŭropo.

*1648,00 EUR*

**K6** kombinvojaĝo el japanio nur al fortalezo

01/08 forflugo el Tokio. 02/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo por la kongresa semajno. 15/08 forflugo de Fortalezo al São Paulo kaj en la sama vespero vi flugos reen al Tokio.

*2452,00 EUR*

**K7** kombinvojaĝo el japanio por la postkongresa ekskurso P1

01/08 forflugo el Tokio. 02/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo por la kongresa semajno. 10/08 forflugo de Fortalezo al Foz do Iguaçu. 12/08 vi flugos de Foz do Iguaçu al Rio de Janeiro. 15/08 vi flugos reen al Tokio.

*2752,00 EUR*

**K8** kombinvojaĝo el japanio por la postkongresa ekskurso P2

01/08 forflugo el Tokio. 02/08 alveno al São Paulo kaj en la sama mateno vi prenos flugon al Fortalezo por la kongresa semajno. 10/08 forflugo de Fortalezo al Manaus. 13/08 vi flugos de Manaus al Rio de Janeiro. 15/08 vi flugos reen al Tokio.

*2752,00 EUR*

# FLUGBILETA MENDILO

Nomo _____

UEA-kodo __ __ __ __ – __ Kongresa numero _____

Retadreso _____ Tel. _____ Fakso _____

Forflugdato ___ /___ / 02 Revendato ___ /___ / 02
tt mm tt mm

Mi mendas la kombinvojaĝon (bv. cirkli):

| | |
|---|---|
| **ANTAŬKONGRESO EL EŬROPO** | **NUR UK EL TOKIO** |
| Rio/Salvador: K1a K1b | Fortalezo K6 |
| Jericoacoara: K2a K2b | **POSTKONGRESO EL TOKIO** |
| **POSTKONGRESO EL EŬROPO** | Iguaçu/Rio K7 |
| Iguaçu/Rio K3 | Manaus/Rio K8 |
| Manaus/Rio K4 | |
| Manaus/Iguaçu/Rio K5 | **Prezo**: **EUR** _____ |

Mi forflugas el flughaveno (bv. cirkli):

**Frankfurto Londono Madrido Milano Parizo Tokio**

Mi volas komenci la vojaĝon el alia flughaveno ol la jam menciitaj supre (bv. indiki la flughavenon): _____kaj volas scii kiom mi devas pagi aldone.

Mi mendis la koncernan antaŭ- aŭ postkongresan ekskurson: Jes Ne

Mi pagas: ☐ el mia UEA-konto kun la supre indikita kodo.

☐ per kreditkarto n-ro _____ valida ĝis _____.
(bv. cirkli: Visa / American Express / Master-Eurocard)
Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto) __ __ __

☐ al la kongresa (poŝt)banka konto _____ en _____.

☐ al mia landa peranto.

*Trakto de la mendo nur post la ricevo de la pago!*
Mi legis la kondiĉojn kaj akceptas ilin.

_____ _____
Loko kaj dato Subskribo